

世界语高等新读本

La Nova Krestomatieto de Esperanto

Kompilita de 孙国璋¹

Dua eldono

上海 商务印书馆

1928

¹ 孙国璋（1886—1965）江苏无锡人。又名孙芾仲。世界语名：K·C·Sun。早年在无锡教育会任职。1909年自学世界语。后热心世界语运动，成为中华民国世界语会、上海世界语会的负责人之一。曾任中国世界语函授学校校长。编辑过世界语函授讲义。1915年组织上海世界语学社，创办世界语夜校，出版世界语星期报。1917年应蔡元培邀请到北京大学担任世界语教师。在此期间曾任国际世界语协会的北京代理员。主要著作有：《世界语高等新读本》(1a Nova Krestomatieto de Esperanto, 70页)、《世界语高等文典》(La Plena Gramatiko de Esperanto)。据“商务印书馆百年大事记”：孙国璋编《世界语高等文典》《新读本》是我国首次正式出版的世界语课本。但“中国出版的世界语书籍目录(1909——1987, 侯晓红编辑, 肖平审订)”中有“《世界语进阶》(Stepby Step in Esperanto), 沈羽著。中国图书公司出版, 1912年初版”、“《世界语教科书》(附详解), (德)鲍雷而著, 沈羽编译。上海中国图书公司, 1911年3月初版。精装, 117页, 32开”。

1996年12月18日，中国世界语图书馆在北京正式开馆，首任馆长为老世界语者刘铃先生（Sesdek）。该馆面向全国提供图书借阅和咨询。

我先后从该馆多次借书，并复印或手抄《Kiel diri》、《Karlo》、《Ekzercoj》等自存。后来因故疏远世界语，曾打算退还借书证，刘先生亲书勉励，表示借书证长期有效，该借书证也就保存至今。多年未联系，不知图书馆现状如何？

本电子版《世界语高等新读本》即根据当年手抄本录入，对刘先生等当年的辛劳表示衷心感谢。希望有原本的朋友能为校对。

Eamo

(chenyinhua_cn@163.com)

Enhavo

TRO GRANDA POSTULO.....	1
UNU VIRINO.....	1
SUBOFICIRO.....	1
LA JARO.....	1
LINGVO MALFACILA.....	1
EL LA PENSOJ DE L'EMINENTULOJ.....	1
VIDPUNKTO.....	1
LA PLEJ GRANDAJ URBOJ.....	2
EL FUNEBRA PAROLADO.....	2
NIATEMPA AMO.....	2
PROCESO.....	2
HOMO ESTAS LIBRO.....	2
TIEL GRANDA.....	3
ĈU LAKTO ESTAS KUN AKVO?.....	3
RENVERSITA LOGIKO.....	3
DRINKAĴO "DUSU"(屠苏酒).....	3
SPERTULINO.....	3
MALBONA JUĜO.....	4
KIEL LEGI LIBRON.....	4
NUR TION.....	4
LA LASTA GLASO DE VINO.....	5
KIU EL VI.....	5
MANĜEGEMO DE ARANEOJ.....	5
FORTA MALKOMPRENO.....	5
LA INFEKTO DE PULMA PESTO.....	6
LA PRIPENSO.....	6
LA EDUKADO.....	6
LA PRINTEMPA ĜARDENO.....	7
ĈU VERAMANTO?.....	7
ALLOGA LIBRO.....	8
HAVU SUNON.....	8
REĜO ... ŜTELHELPANTO.....	8
VIVANTA LINGVO DE VIVANTA POPOLO.....	8
LA ŜTELISTO DE ANASEROJ.....	10
ESPERANTO KAJ ARI-LINGVOJ.....	10
KRUELECO.....	10
LA DELEDITO, KIU PERDIS SIAN MANUSKRIPTON.....	11
NEREFUTEBLA PRUVO.....	11
HUNDA AMIKECO.....	12
MALPUNO.....	12
PORTRETOJ.....	12
ANKAŬ LI VOLAS VIVI.....	13

VOJAĜMOTIVOJ DE LA NACIOJ.....	13
EL MUZIKTEORIO.....	13
LA PRINCO KAJ LA DUONBLINDULO.....	14
UTILO DE LA PUBLIKAJ ANONCOJ.....	14
TRI MUŜOJ.....	14
MODERNA PENTRAĴO.....	15
PENTRARTO.....	15
LA SOMERO.....	16
UTILINTA MINACO.....	16
LA VERA RENKONTEJO.....	16
VEZIRO ABDUL.....	17
ŜPAREMA.....	17
UNU BONA PASTRO.....	17
NETITOLITA.....	18
PRI LA ESTONTECO DE LA SUNA SISTEMO.....	18
NOVA ENCIKLOPEDIA.....	18
GUELIVER EN LILIPUTLANDO.....	19
KOLORIGO DE NATURAJ FLOROJ.....	19
REKORDO DE MALRAPIDECO.....	20
PRINTEMPAJ AKVOJ.....	20
MIRAKLA FULMO.....	20

TRO GRANDA POSTULO

— For! Al sanaj kaj fortaj mi almozon ne donas.

— Kiel vi volas: por viaj kelkaj centimoj mi al mi piedon* ne rompos.

*al mi piedon = mian piedon

UNU VIRINO

Unu virino plendis al kapitano, ke ŝi estas ĉirkaŭrabita de liaj soldatoj—
Ĉu ili ĉion forportis? Demandis la kapitano.

—Ne, ili restigis ion.

—Nu, sekve tio ĉi ne estas miaj soldatoj, miaj prenas ĉion.

SUBOFICIRO

—Homoj, ĉiam kuraĝe kaj diligente, kaj vi ĉion atingos! La ovo de Kolombo* ankaŭ ne estas metita en unu tago!

*哥伦布曾命众人把鸡蛋立起来，但都不能；于是哥伦布把鸡蛋击破，把鸡蛋立了起来，对反对者说：击破而立畴不能之，愿吾则第一人发明此法耳。

本篇副官本意谓哥伦布觅新大陆之坚忍，然如此说来，适成笑话。

LA JARO

—Kiom jara vi estas, Manjo?

—Hejme sesjara, sed en vagono kvarjara*.

*四岁免票。

LINGVO Malfacila

Dom mastro: Kian malagrablan bruon faras hodiaŭ nia loĝanto en supra etaĝo? Kion signifas do tiu ĉi senĉesa siblegado kaj kraĉado*?

Ĉambristino: Li komencis lerni la Anglan lingvon.

*sibli 发齿音， kraĉi 发喉音。

EL LA PENSOJ DE L'EMINENTULOJ

(1)Neniam aŭskultu tiujn, kiuj parolas malbone pri aliaj kaj bone pri vi.
——Tolstoj

(2) Oni devas kredi je la ebleco de feliĉo por esti feliĉa.——Tolstoj

(3) Estu severaj al vi mem kaj favoraj al aliaj kaj vi ne havas malamikojn.——el Juna Esp-isto

(4) Pagu bonon por malbono.——Talmudo

(5) Estas du vojoj kondukantaj al perfekta boneco: esti justa kaj ne fari malbonon al vivaj estaĵoj. ——Tolstoj

(6) Vivu laŭ la naturo, kaj vi neniam spertos malriĉecon; vivante laŭ la opinio de l'mondo, vi neniam estos sufiĉe riĉa.

VIDPUNKTO

“Vidu— tie flugas aeroplano.” — “ Vere, tie estas danĝera sporto, ja, la flugmaŝino,” — “ Jes, ĝi povas fali sur la kapon de piediranto.”

LA PLEJ GRANDAJ URBOJ

Ĉiu scias, ke Londono estas la plej granda kaj plej multthoma urbo de la mondo, ĝi havas 7 milionojn da loĝantoj.

Laŭvice je multthomeco sekvas: Nov-jorko kun 4 767 000, Parizo 2 700 000, Tokjo 2 186 000, Ĉikago 2 185 000, Berlino 2 071 000, Vieno 2 031 000, Petrogrado 1 907 000, Filadelfio 1 549 000, Moskvo 1 481 000, Osako 1 227 000, Rio de Janeiro 1 129 000, kaj Buenos-Aires kun 1 026 000 loĝantoj. Pekino eble estas samvica kiel Tokjo kaj Berlino.

EL FUNEBRA PAROLADO

Oratoro(super la tombo de neamita kolego): Ni ĉiuj scias, ke la mortinto estis sentaŭga diboĉulo, mensogulo, mallaborulo, sed post la morto ni pardonu lin. Ni forgesu ĉiujn malbonojn, per kiuj li nin ofendadis en sia vivo, —kaj ni eĉ metu florkronon sur lian tombon, ĉar li mortis.

NIATEMPA AMO

—Mi vin amas ... — Sed mi estas malriĉa.

— Pardonu, vi ne lasis min elparoli ĝis fino ... Mi amas vin ne tiel, por edziĝi je vi ...

— Ha, ha, ha! Mi volis nur elprovi vin, mi havas grandegan kapitalon!

— Pardonu, vi tamen ne lasis min fini. Mi amas vin ne tiel, por edziĝi je vi pro via mono.

PROCESO

En unu societo oni demandis pentriston kiel oni povas la plej reliefe prezenti du procesantojn, el kiuj unu gainis la proceson kaj la dua ĝin perdis.

— Mi pentrus la unuan en ĉemizon kaj la duan nuda. Respondis la pentristo.

*是灼知司法现象者，阅者诸君，当能识其意何所指。

HOMO ESTAS LIBRO

La homo— laŭ poeto Geoffry — estas kiel libro. Lia naskiĝo estas la titolpaĝo. Lia bapto, la dediĉo. Liaj krioj kaj ĝemoj, la antaŭparolo al la legantoj. Lia infaneco kaj infanaĝo, la argumento kaj enhavo de la tuta traktato sekvanta. Lia vivo kaj agoj, la temo. Liaj krimoj, pekoj kaj kulpoj, la preseraroj. Lia pento, la tabelo de eraraĵoj. Estas volumoj en formatoj “ in-folio*” kaj aliaj malgrandaj; kelkaj estas bele binditaj; ekzistas el forta pergameno; ekzistas ankaŭ el maldika papero; unuj havas kiel temon la piecon kaj bonecon; kaj aliaj multenombraj, estas diboĉaj. Sed sur la lasta paĝo de ĉiu, estas ĉiam unu vorto:” Fino”.

* in-folio 为书之寸法: in-8 为八开, in-16 为十六开。

TIEL GRANDA

“Nia botmagazeno” fanfaronis unu komizo,” estas tiel granda, ke ni eĉ havas propran brutaron!... “ — ”Nu,” diris alia komizo:” nia botmagazeno estas pli granda. Aĉetante botojn en unu ekstremo, oni jam truigas ilin antaŭ ol atingi la sojlon. Tiel grandega estas nia magazeno.”

ĈU LAKTO ESTAS KUN AKVO?

Oni povas scii, ĉu lakto estas kun akvo, en la sekvanta maniero: bone poluritan trikiloj oni trempas en profundan vazon da lakto, tuj ĝin elprenas returne kaj tenas ĝin rekte malsupren. Se la lakto estas pura, tiam guto da lakto restos pendanta sur ĝi; sed se eĉ tre malgranda kvanto da akvo estas verŝita en la lakton, tiam nenia guto pendos sur la trikilo.

RENVERSITA LOGIKO

Antaŭ nelonge, en Parizo, policano arestis vagulon, kaj akompanis lin al la policejo. La vagulo ne parolis eĉ unu vorton france (li parolis nur germane), kaj la komisaro tute ne konis germanan lingvon; li do venigis franca-germana interpretiston por pridemandadi per li la arestiton.

- Kie vi naskiĝis? — demandigis la komisaro.
- En Parizo.
- En Parizo? Vi do estas franco...
- Ho ne, Via sinjora moŝto, mi ne estas franco, mi estas germano.
- Sed, ĉar vi naskiĝis en Franclando, vi ja devas esti franco!
- Kial? Nu, se mi estus naskiĝinta en stalo, ĉu mi devus esti ĉevalo?

DRINKAĴO “DUSU” (屠苏酒)

Laŭ nia kutimo en la unua monato de lunkalendaro jaro, ĉinoj trinkas Dusu-drinkaĵo. La devenon oni ne scias kaj la efiko ne estas certa. Jen estas la recepto:

Atraetilo(白术) 3 Kampanolo(桔梗) 3 Pipro(川椒) 3
Silerio(防风) 3 Cinamo(桂枝) 2 Kariofil-butono(丁子) 2

Enpakigu la ses drogojn per ruĝa tolo kaj ĝin trempu en ia alkoholaĵ; do la Dusu-drinkaĵo estas preparita.

SPERTULINO

Dum babilado, unu el la sinjoroj rakontis pri pentristoj. Li diris:” Unu el miaj amikoj estas pentristo. Pro plezuro li pentris en ĉiuj plafonanguloj de sia ĉambro araneaĵojn* tiom natursimilaj , ke lia servistino penadis forigi la araneaĵojn dum plenaj du horoj.”

“Sensencaĵo!” diris iu sinjorino vidigante nekredeman vizaĝesprimon;
“Mi ne dubas, ke povas ekzisti tiom lerta pentristo, sed tute ne eble ŝajnas al mi,
ke ekzistas tiom laborema servistino.”

*araneaĵo(j) = arane-reto

MALBONA JUĜO

“La virinoj taŭgas por nenio; ili ne taŭgas eĉ por surkudri unu butonon,”
diris unu pesimista misogamo germana.

Preskaŭ tiel same opiniis pri la virinoj la granda norvega poeto Ibsen. Li
havis la kutimon kudri mem la butonojn sur siaj vestoj, dirante, ke tion li faras
ĉar “la virinoj estas sen pripensaj kaj ili ne estas kapablaj juĝi pri la
longdaŭremeco de la surkudraĵo.”

Tiun diron Ibsen ofte ripetis, eĉ publike, al gastoj, en ĉeesto de sia edzino.
Sinjorino Ibsen kontentigis sin per afabla rideto; Tamen, ŝi kelkfoje, per
mallaŭta voĉo, klarigis al gastoj: “Mi ĉiam estas devigata postkudri liajn
butonojn post lia kudro; ĉar li, fininte la surkudron, neniam faras nodon sur la
fadeno.”

KIEL LEGI LIBRON

- (1) Respektu bonan libron, ĉar ĝi alportas al vi ĝojon kaj saĝecon.
- (2) Legu nur bonan libron.
- (3) Se vi aĉetas libron, antaŭe demandu kompetentan spertulon.
- (4) Legu ne multajn librojn, sed legu unu libron multfoje.
- (5) Legu malrapide.
- (6) Pripensadu kian veron kaj belaĵon diras la libro.
- (7) Ellernu parkere, kio plaĉas al vi.
- (8) Notu al vi verkojn, kiujn vi jam legis, de kiu ili estas kaj kion ili
pritraktas,—en vian notkajeron.
- (9) Prijuĝu la agojn de cititaj en ĝi personoj: ĉu ili estas bonaj aŭ malbonaj.
- (10) En libroj vi legas pri amo al via proksimulo, pri justeco kaj pri nobla
aŭ malnobla agado. Faru nur bonon, kaj agu honeste.
- (11) Legu ne multe, sed ĉiutage. Kaj en ĉiutago faru ion laŭdindan. Kaj se
la rezultato mem eĉ estus malgranda, —ekzemple eltiro de formiko el akvo,
—multon vi estis farinta.
- (12) Lernu esti bonanima, amu la veron kaj belecon. Sur tio baziĝas la celo
de la vivo.

Sino M. Kubaskova

NUR TION ...

Dum du plenaj horoj krarigis iu urbano al sia parenco vilaĝano, la
meĥanisman de l'aŭtomobilo.

—Nu, kara parenco, —diris la urbano,—mi esperas ke vi bone komprenis
min kaj vi nun klare konas ĉiujn misterojn de l'aŭtomobilo.

—Jes, — respondis la vilaĝano, —nun mi klare konas ilin; mur tiun ĉi solan mi ne komprenas; kiamaniere povas okazi, ke la aŭtomobilo marŝas sen ĉevaloj.

LA LASTA GLASO DE VINO

Karlo XII, reĝo de Svedujo, multe drinkadis kaj ofte estis ebria. Iam, en sia ebria stato, li akre ofendis sian patrinon. La sekvintan tagon, resobriĝinte, li konsciis pri sia hieraŭa bedaŭrinda ago, kaj li decidis ĝin ripari.

Ĉe la tagmanĝo, li alportigis al si unu glason da plej bona vino. Li stariĝis, levis alten la glason, kaj kvazaŭ toste, solene deklaris, ke jen li nun, per tiu ĉi glaso, adiaŭas por ĉiam al la drinkado.

Kaj tiam li eltrinkis la vinon el la glaso, la lastan dum sia vivo. Li brave plenumis sian promeson.

... Kiel bone povas regi milionojn da homoj tiu, kiu povas regi sin mem!

KIU EL VI

Sinjoro Maltraff Ŝanceliĝis: li ne povas scii, ĉu F-ino Manjo estas F-ino Sonjo, aŭ ĉu F-ino Sonjo estas F-ino Manjo. Efektive la dubo estas ebla, tial ke la du fratinoj tro similas unu la alian, ke cetere ili estas samaĝoj, ĉar ili estas dunaskitinoj.

Ian tagon S-ro Maltraff ekvidis unu el tiuj fraŭlinoj; li sopozas, ke ŝi estas F-ino Manjo, sed li ne estas certa. Li do decidis, ke li tuj eliros el tiu ĝenanta konfuzo. Li aliros al la junulino, kaj ĝentile salutinte, li parolas: “ Pardonu, fraŭlino, havu la bonecon diri al mi, ĉu mi troviĝas antaŭ vi aŭ antaŭ via fratino?”— La junulino moke rigardas lin kaj respondas: “ Antaŭ mi, sinjoro.”—Malgraŭ tiu preciza klarigo, S-ro Maltraff ankoraŭ ofte demandas sin, ĉu F-ino Manjo estas F-ino Sonjo, aŭ ĉu F-ino Sonjo estas F-ino Manjo.

MANĜEGEMO DE ARANEOJ

Laŭ la fama angla scienculo Johano Lubbock, konata kiel esploristo pri la vivmaniero de insektoj, la araneoj estas tre manĝegemaj. Jen kurioza konkludo pri tio ĉi:

Plenkreska homo, laŭ sia pezo, proporcie al la pezo de l’araneoj, devus manĝi dum unu tago, kompare kun la memnutrado de tiu insekto: du tutajn bovojn, dektri ŝafojn, dek porkojn kaj kvar bareletojn da fiŝoj.— Bonan apetiton.

FORTA MALKOMPREENO

Johano, vilaĝano, vizitis sian kuzon loĝanta en la ĉefurbo. La kuzo kaj lia edzino kun granda ĝojo akceptis lin, kaj ili faris ĉion eblan, por ke lia restado ĉe ili estu kiel eble plej agrabla.

Johano spertinte la grandan gastamon, sentis sin tre bone ĉe ili, kaj tute ne pensis pri reiro en sian hejman vilaĝon. Tion la kuzaj geedzoj baldaŭ rimarkis

sed ili nenion diris al Johano, kies longa restado komencis esti iom malagrabla al ili.

Kiam la restado de Johano jam fariĝis tiel longa, ke ĝi tedis ilin, la bokuzino ĝentile aludis al li pri foriro, dirante:

—Ĉu vi ne pensis, kara bokuzo, ke via edzino kaj viaj infanoj jam enuas pro tio, ke vi ne estas inter ili?

—Jes, vere,—respondis Johano,— Vi estas prava; donu do al mi skribilaron, mi tuj skribos al ili, ke ankaŭ ili venu ĉe vi.

LA INFEKTO DE PULMA PESTO

Rezulte de 12 serioj de eksperimentoj, dum kiujn 82 “duoblaj tasetoj de Petri” kun agaro estis uzitaj*, el kiuj sur 78 ĉiuj kreskigitaj mikroboj estis laŭeble plej detale esploritaj, D-ro Strong kaj Teagne alvenis al jenaj konkludoj:

(1) En kazoj de pulma pesto pestaj mikroboj estas eligataj kun respirata aero nek dum normala spirado nek dum dispneo. (2) Kontraŭe, dum tusado, eĉ kiam ŝajne nek unu ero da sputo estas elĵetata, pestbaciloj povas grandamase esti dissemataj en aeron, ĉirkaŭantan malsanulon. El eksperimentaĵoj de la doktoroj S. kaj T. sekvas, ke portado de maskoj kaj laŭeble plej zorga bandaĝado de haŭtpartoj kun freŝaj gratvundetoj devas esti varmege rekomendataj kiel tre bona antaŭgardilo kontraŭ pestinfektiĝo. La okuloj ankaŭ devas esti gardataj per konvenaj okulvitroj.

La pestbaciloj, pendigitaj en gutetoj de kraĉeroj pereus pro sekiĝo dum kelkaj minutoj, se la atmosfero ne estus saturita de humideco. Ordinare en landoj kun tre malvarma klimato la atmosfero estas ofte malseka, kontraŭe al lando kun varma klimato. Jen la ĉefa kaŭzo, kial la pesta epidemio disvastiĝas pli rapide kaj daŭras pli longe en landoj kun malvarma klimato.

*Petri 氏皿，常用的培养器皿。 agaro=agar-agar 石花菜

LA PRIPENSO

Unu oficiro, kiu perdis sian desktran manon dum milito, petis la reĝon pri pensio.

—Mi ne scias,—respondis al li la reĝo,—Ĉu mi povas fari tuj; mi pripensos.

—Se mi estus dirinta:— “mi pripensos,” batalante kun la kontraŭularo de via reĝa moŝto,—respondis la oficiro, mi nun havus mian manon, mi povus labori kaj ne bezonas pension.

La reĝo senkolere pravigis lin kaj tuj difinis por li pension.

V. Selivanov

LA EDUKADO

En la eduka problemo kuŝas la granda sekreto de la perfektigo de l’homaro. —Kant.

La edukado povas ĉion, eĉ dancigi ursojn.

—Leibnitz.

Plej grava estas la unua edukado; ĝi ne kontesteble apartenas al la virinoj.
—J. J. Rousseau.

Kiu ne volas, ke la kampulo scii, legi kaj skribi, tiu sendube eltiris renton el lia malklereco.
—Mirabeau.

La estonteco de la infanoj ĉiam estas la verko de iliaj patrinoj.
—Napoleono.

Nur dum juneco estas forĝebla la homa spirito. —Pitagoro.

La edukado kreas pli da honestaj homoj ol la naturo. —Demokrito.

LA PRINTEMPA ĜARDENO

En printempo ĉiuj plantaĵoj preskaŭ floras kiel brodaĵo sur la natura silkŝtofo. En ili unuj prezentas al ni ĉarman bonodoron, aliaj — belan koloron; unuj estas arbetoj, aliaj herboj. Jen mi skribas kelkajn nomojn: narciso, orkido strange bonodora, pruna floro, persika floro, rozo, floroj de magnolio, azaleo, tearbo, peonio, dicentro, vistario, spireo, hamamelo k.t.p. Ĉar oni ne posedas varmdomon, la printempa floraro estas precipe de arbetoj.

Lastatempe la ĝardenistoj kaj kelkaj domĝardenoj konstruas al si la vitroĉambrojn por varmigi la plantaĵojn specialajn kiaj en vintro kreskadas kaj floras dum frua printempo dank'al la alta varmeco. Se vi vizitis nun la ĝardenon, vi certe vidos kiel multe estas da florspecoj: bulbaj kaj herbaj nome: anemono, hiacinto, primolo, cineralio, geramio, safrano, tulipo, dianto, papavo, papaveto, lezedo, violoj trikolora kaj bonodora, kaj multaj herboj.

*梅, 李, 同为 pruno. 玉兰, 辛夷, 天女花, 木兰, 厚朴花, 均名 magnolio. 牡丹, 芍药, 同为 peonio, 惟吾人可以 peonio arbeto kaj herba 分别之。笑靥, 荼蘼, 珍珠花, 均为 spireo. 风信子俗名洋水仙。cineralio 吾国近日盛植之, 春菊云者, 求行文之便姑定一名耳。值腊红, 译音之变。

(译文: 春时百花争放, 灿如锦绣, 或放奇香, 或呈异采, 或为木本, 或为草本。试略举其名如下: 水仙, 芬芳之兰, 李花, 桃花, 月季, 玉兰, 杜鹃, 山茶, 牡丹, 荷包牡丹, 紫藤, 笑靥, 迎春诸花。春花以木本为多数, 盖以无温室故耳。

顾植物中有可以赖温度之力而冬期发育早春开花者, 故近时园艺家及庭院中均建造玻璃室以烘托植物。君等试一顾期园庭, 必见种种之花色, 球根类以及草木类, 如白头翁, 风信子, 樱草, 春菊, 值腊红, 泊夫兰, 郁金香, 石竹, 罌粟, 虞美人, 水木樨, 三色堇, 香堇, 诸种是也。)

ĈU VERAMANTO?

Sinjoro Pafaĉuly estas pasia ĉasanto... Oni eĉ povas diri “ĉasito”, ĉar vere li preskaŭ pasigis sian tutan tempon per ĉasado. Liaj ĉasrezultatoj estas sufiĉe bonaj; sed, rakonte pri siaj ĉasadoj, li ĉiam pli grandigas siajn ĉas sukcesojn.

Hieraŭ, ekzemple, li mortpafis naŭ leporojn. Hodiaŭ li venis en la amikarejon por rakonti sian hieraŭan sukceson.

—Mi mortpafis naŭdek naŭ leporojn,—li diris. Ĝenerala rido akceptas tiun

ĉi maltiman aserton. Unu el la aŭskultantoj eĉ riskis rimarkigi al li:

—Naŭdek naŭ leporojn? Sed , kara amiko, se tio ĉi estas vera, vi senĝene povus diri cent!

Sinjoro Pafaĉuly kun plej serioza mieno respondis:

—Kial? Mi ja ne volas mensogi pro unu leporo!

ALLOGA LIBRO

En la pasinta jaro 1913, unu germana libreldonisto, por akiri kiel eble plej multe da aĉetantoj, donis al sia nova libro tiun ĉi atenttiran titolon: “Kion ĉiu junulino devas scii antaŭ sia edziniĝo.”

La rezultato estis miriga: dum tre mallonga tempo tridek mil ekzempleroj estis disvenditaj en Germanujo. La alloga titolo faris sian fruktdonan efikon,—kompreneble — Ĉar la avidaj junulinoj tute ne suspektis, ke la tuta enhavo de tiu ŝatinda verko estas ... Receptaro de kuirarto.

Poste, kelkaj kolegoj faris proceson kontraŭ la ruza eldonisto, pro “maldeca konkurado”; sed la tribunalo pravigante la kulpigiton, malkondamnis lin —ĉar la kuirarton vere devus koni junulino antaŭ sia edziniĝo.

HAVU SUNON ...

Havu sunon en koro, ĉu ventegas kaj pluvos, ĉu malheliĝas la ĉielo, malplaĉigas la tero.

Havu sunon en koro. Via vivo estos luma eĉ se malheliĝas via sorto.

Kantu eĉ se zorgoj vin penigas, kantante vi venkos la solecon plej grandan.

Estu bonkora! Ne perdu kuraĝon!

Havu sunon en koro, vi venkos la sorton...

REĜO ... ŜTELHELPANTO

Dum la regado de Ludoviko XIV-a okazis foje ke ŝtelisto penetris en Versailles’an palacon.

La ŝtelisto klopodis dekroĉi altvaloran murhorloĝon, kiam, neatendite la reĝo eniris en tiun ĉambron. La ŝtelisto, kiu verŝajne ne konis la reĝon ne konfuziĝis; kontraŭe, tute trankvile li diris al la reĝo:

—He, mia bona, bonvolu iom apogteni la ŝtupetaron, ĉar mi timas, ke ĝi glitos kaj mi falos teren.

La reĝo ridetis pro tiu naiveco kaj apogtenis la ŝtupetaron. Li opiniis, ke la ŝtelisto estas horloĝisto-laboristo, kiu forportas la horloĝon por ĝin ripari.

La sekvintan tagon la maltima ŝtelo elsciigis; oni raportis pri ĝi ankaŭ al la reĝo. Tiu ĉi, mirigita, aŭskultis al raporton, poste eksplodis je ridego, dirante:

—Sinjoroj, mi petas, ne parolu pri tiu ĉi okazintaĵo, ĉar ... mi mem estas kunkulpulo de la ŝtelisto.

VIVANTA LINGVO DE VIVANTA POPOLO

I

Ĉiu lingvo vivanta havas propran spiriton, ĝi reprezentas la sentojn kaj ideojn de la popolo, kiu ĝin parolas, kaj lingvo povas vivi nur per tiu propra spirito, kiu kreas ĝian literaturon. Pro tio, se D-ro Zamenhof estus nur lingvisto, li estas kreinta artefaritan lingvon, kiu eble restus senviva teoria projekto, kiel tiom da aliaj. Sed antaŭ ol esti lingvisto kaj vere antaŭ ĉio, nia majstro estas “homo”. En nian lingvon li jam de la komenco enblovis “homan” spiriton. En ĝi li verkis “homajn” poemojn. Kun ĝi li ligis grandan ideon kaj noblan senton. Tiel, kune kun la lingvo, li fondis popolon kaj, laŭ sia propra konfeso, li fondis la lingvon nur pro kaj por tiu nova popolo. Kaj tiu popolo nun vivas kaj kreskas ĉiujare. (Daŭrigota)

II

Kiu studis la historion de la lingvoj, tiu scias, ke la lingvoj vivas kaj evolucas nur dank’al “sentaj” movadoj, neniam dank’al decidoj de lingvistoj. Ĉiuj scias, kiel la potenca movado komencita de Luther en Germanujo progresigis la germanan lingvon, dum samtempe ĝi transformis muzikarton kaj kantadon. Kiu konas la historion de franca lingvo, tiu bone scias kiel, ĉe la komenco de la lasta centjaro Chateaubriand, per enkonduko de “nova sento” en la literaturon komencis la grandan sentimentalan movadon, kiu tiel riĉigis la francan lingvon kaj baldaŭ donis al ĝi Victor Hugo kaj lian skolon. (Daŭrigota)

III

Nu, ĉu la unua verso de nia amata himno ne estas: “En la mondon venis nova sento ...”?

Jes, tiu “nova sento” estas la kaŭzo, kia nia lingvo allogis tiel fervoran armeon da adeptoj. Tiu “nova sento” donas al la esperantista popolo ĝian entuziasmon, ĝiajn kantojn, ĝian poezion, ĝian literaturon, unuvorte ĉion, kio faras la vivon de iu nacia lingvo.

Sed dum ofte la nacia patriotismo devigas homojn malami aliajn naciojn, kaj aliajn lingvojn, nia internacia kaj pura esperantismo nur igas nin ami ĉiujn popolojn kaj iliajn lingvojn.

Tiel ĉiu homo povas — kaj ĉiu ja devus —ami samtempe sian nacian lingvon por sia kara patrujo kaj Esperanton por la tuta homaro.

IV

De dudek jaroj, sur la lipoj kaj sub la plumo de l’esperantistoj, nia lingvo viviĝis kaj kreskis ĉiutage pli kaj pli. Ĝi nun estas vere vivanta lingvo, kiu komencis saman naturan evolucian, kiel la aliaj lingvoj kaj kiun de nun neniu en la mondo povas arbitre tuŝi.

Nia lingvo estas sur plej bona vojo. Ni povas iri antaŭen kun plej plena fido kaj renovigita kuraĝo, ĉar en niaj koroj kuŝas nun definitiva certeco pri la vivo de Esperanto.

Vivos Esperanto por la bono de la homaro.....

LA ŜTELISTO DE ANASEROJ

Iun tagon, homo venis al Salomono kaj diris:

—Ho, profeto, mi havas najbaron, kiu ŝtelas miajn anserojn kaj mi ne povas malkovri la kulpulon.

—Bone, —respondis Salomono,—mi okupiĝos pri cia afero, al neniu parolu pri ĝi.

Efektive, je la kunveno de la fideluloj en la templo, kie la profeto instruadis, li subite rigardis akre kaj severe la ĉeestantaron kaj diris:

—Estas inter vi homo, kiu ŝtelis anserojn de sia najbaro kaj li havas la senhontemon veni en la templon kun la plumoj sur la kapo!

Ĉe tiuj vortoj viro konfuzite metis rapide la manojn al sia kapo.

Prenu tiun viron,—diris Salomono,—kaj frapadu lin; li estas la kulpulo!

ESPERANTO KAJ ARI-LINGVOJ

La gramatiko de Esperanto venas entute el indo-eŭropa fonto, kaj estas rezultato de studado kaj simpligo de l' gramatikoj de la modernaj eŭropaj lingvoj.

La historio de Esperanto do ne komenciĝis kun si mem, sed jam kun la historio de siaj prapatroj. La radikoj de nia vortaro alportis kun si en la novan lingvon la forton kaj la intereson de sia longa antaŭa historio tra la dialektoj de l'ariaj gentoj.

Resume, estas utile memori, ke la vortaro kaj gramatiko de Esperanto estas eltiritaj de l'indo-eŭropa fundamento tia, kia ĝi ankoraŭ aperas en la modernaj lingvoj de l' romana, germana kaj slava grupoj. Esperanto estas komuna lingvo de l' modernaj-ariaj gentoj de l' Okcidento kaj pro tio kompreneble speciale facila por ili. Tamen la homoj de ne-ariaj gentoj ĝin ankaŭ facile lernas pro ĝia rimarkinda simpleco kompare kun la ofte tre granda malfacileco de siaj propraj lingvoj.

Se oni trarigardas verkon kiel la “Universala vortaro” de Zamenhof, “Naŭlingva Etimologia leksikono” de Louis Bastien, oni vidas, ke la plej granda nombro de radikformoj elektitaj en Esperanto ekzistas samtempe en diversaj vortoj de preskaŭ ĉiu romanaj kaj germanaj lingvoj kaj eĉ ofte de l' slavaj.

Esperanto	Latina	Franca	Itala	Hispana	Portugala	Germana	Angla	Rusa
Abato	abbas	Abbé	abate	abad	ablade	Abt	abbot	abbat
Bruna	—	brun	bruno	bruno	bruno	Braun	brown	brunet
Horo	hora	heure	ora	hora	hora	Uhr	hour	—
Karto	charta	carte	carta	carta	carta	Karte	card	kerta
Vino	vinum	vin	vino	vino	vinho	Wein	wine	vino

*aria = indo-eŭropa

KRUELECO

Filipo IIa, reĝo de Hispanujo, estis tiel barbara, ke la inkvizitoroj, por plaĉi al li, invitis lin por rigardi la spektaklon de aŭtodafeo. En la jaro 1559, en Valladolid, la reĝo ĉeestis nun tian teruran spektaklon, je kiu oni bruligis vivantan unu junulon suspektitan de la inkvizicia tribundo pri protektado de l' protestantismo. Kiam la flamoj de la ekzekuta brullignaro atingis la piedojn de la kompatinda viktimo li direktis petegan rigardon al la reĝon. Sed tiu ĉi, sen emocio, sen kompato, diris al la inkvizitoroj:

—Volonte mi liverus al vi eĉ mian propran filon, se li herezus. Kaj se vi ne havus sufiĉe da ligno por lin bruligi, mi mem alportus la bezonatan kvanton da ĝi per miaj propraj manoj.

LA DELEDITO, KIU PERDIS SIAN MANUSKRIPTON

Kelkajn minutojn antaŭ la momento, kiam li devos paroli, li volis preni el la poŝon la multekostan paperon. Li metas la manon en la dekstran poŝon, nenio; en la maldekstran, nenio; en la ekstrajn poŝojn de l' surtuto, en la pantalonajn, en la veŝtajn, ĉie nenio; li fable rigardas en la paperujon, en la monujon, internen de sia ĉapelo, ĉiam nenio. Kredeble li ĝin forgesis en sia ĉambro; nun estas tro malfrue por iri tien. Kia malfeliĉo! Tia bela parolado! Kion fari? Li penas memore kelkajn frazojn; li bone trovas la finon, sed la komenco ĉiam forflugas. Kaj nun la sekretario vokas: “S-ro Sennomulo el Sennomaj insuloj.” Kun timo li antaŭen iras sur la podiumon kaj komencas paroli kun tremanta voĉo. Nun la frazoj de la forgesita manuskripto venas en la kapon, sed senorde, intermikse, speco de la vorta kaĉo, kiu gluas la lipojn. Ĉar oni ne bone komprenas, oni multe aplaŭdas.

NEREFUTEBLA PRUVO

La glora amerika verkisto Mark Twain estis rigardata kiel la unua spritkapablulo kaj talento de Usono. Oni atribuas al li multenombrajn spritaĵojn kaj sennombrajn mistifikaĵojn. Jen unu el ili, tute aŭtenika:

Unu klerulo, fama oratoro faris publikan paroladon antaŭ distinginda publiko, Mark Twain, laŭ sia bonhumora kutimo, intencis lin kritikaĉi. Li diris al li:

—Via parolado estis bonega, kara sinjoro; mi nur rimarkigas al vi, ke mi havas en mia biblioteko unu libron, en kiu ĉiuj vortoj de via bela parolado troviĝas, de la unua vorto ĝis la lasta.

La klerulo tre embarasiĝis kaj konfuziĝis; ja estas terure esti kulpigita pri plagiato. Li do postulis klarigon de Mark Twain, kiu promesis, ke morgaŭ li sendos tiun libron al la klerulo.

Kaj fakte, la morgaŭan tagon la eminenta oratoro ricevis de Mark Twain

unu libron, zorge enpakitan. Malfermante la pakajon, li elprenis el ĝi unu ...vortaron!

HUNDA AMIKECO

En Tylza okazis kurioza akcidento. Du hundoj, devenantaj de la raso de Sanktbernardaj hundoj, entreprenis ekskurseton. Ili iris ĉasi kontraŭ anasoj, kiuj multenombre amasiĝadas sur la ne frostiĝantaj marĉoj de Memel. La hundoj rampadis sur la maldika glacio.

Subite la glacio ekrompiĝis sub ili, kaj ili ambaŭ enfalis en la akvon. Unu el ili sukcesis elsalti sur la glacion, sed la fortega glacio fortrenis la duan laŭ la ondofluado.

Ĝia kunulo iradis embarasita, nur laŭte bojante, ĝis fine ĝi ekkaptis la amikon per la dentoj je la nuko, kaj altiris ĝin al la bardo.

H. Polworska

MALPUNO

Iam reĝo vizitis malliberejon. Inter aliaj, li ankaŭ interparolis kun la malliberuloj, demandante ilin pri la kaŭzo de ilia puno.

—La juĝisto eraris,—diris la unua,—mi estas senkulpe malliberigita, mi faris nenian pekon.

—Falsaj atestantoj agis kontraŭ mi, — parolis la dua, —oni nin kondamnis senkulpe.

—Oni subaĉetis la juĝiston, — pretendis la tria,—mi maljuste estas punita.

—Mi nur bonfaris — asertis la kvara, —tamen oni arestis min. Senrajte oni metis min en la malliberejon.

Kaj tiamaniere ĉiu certigis la reĝon pri sia senkulpeco.

Fine li demandis la lastan.

—Kaj vi, kial oni alportis vin ĉe tien?

—Ĉar mi ŝtelis ĉevalon.

Tiam la reĝo sin turnis al la direktoro de la malliberejo kaj diris:

—Tuj forpelu tiun ĉi ŝteliston el la domo! Tia fripono ja ne meritas restadi inter tiom da honestaj homoj.

PORTRETOJ

I

Korneljo, la malafabla. — Korneljo malofte salutas: salutita, li apenaŭ respondas; li ne faras demandojn ne necesajn: demandita, per iom da silaboj li rapidas. Riverencojn li faras malafable aŭ ne faras; neniam li ĉirkaŭ prenas por ceremonii, por moki li parolas al neniuj; mli seke parolas, al laŭdoj li turnas dorsen. Aŭdante pri suferoj de amikoj li malĝojiĝas, paliĝas, larmoj aperas en liaj okuloj; li pruntedonas volonte kaj tuj, klopodojn kaj monon, se ili estas bezonataj.

Korneljo estas de ĉiuj juĝata — kiel malafabla kaj malbonkora viro.

De Gaspare

Gozzi

II

Lisandro, la afabla. —Lisandro, sciigita de sia servisto, ke amiko venas viziti lin, kunpremas kaj grincigas la dentojn; per la piedoj li frapas teren; li grumblas, koleras. La amiko eniras: Lisandro aranĝas sian vizaĝon, li ĝoja kaj plezura igas ĝin; li afable akceptas, ĉirkaŭprenas sian amikon kaj diras konvenaĵojn: li plendas, ke de longa tempo li ne vidis lin; se li baldaŭ ne vizitos lin, li minacas lin per sia kolero. Novaĵojn li petas pri lia familio, pri liaj aferoj. Ĉe ĉiu vorto li havas novas vizaĝon. La amiko estas elironta: “Ho, kial tiel frue?” li diris. Nur kun ĉagreno li povas lasi lin eliri. La lastaj vortoj estas: “Rememoru min. Venu. Mia domo estas via ĉiutempe.” La amiko eliras. La pordo de ĉambro estas fermita. — “Malbenita vi estu!” diras Lisandro al la servisto, “ĉu mi ne diris al vi, ke mi ne volas ĝenulojn? Diru ĉiam, ke mi forestas. Tiun viron mi ne volas!”

Lisandro estas ĉiam laŭdata kiel afabla kaj bonkora viro.

G. G.

ANKAŬ LI VOLAS VIVI

Viro venis al kuracisto kaj diris, ke li estas iom malsana.

—Ĉiam, kiam mi estas malsana, mi iras al kuracisto.

—Jes, tiel estas ĝuste. —diris la kuracisto.

—Jes, ŝajnas al mi, ke la kuracisto ankaŭ devas vivi; kaj kiam mi ricevis la recepton, mi iras al la apoteko, ĉar la apotekisto ankaŭ devas vivi, —diris la viro.

— Sed kiam mi revenis hejmen, mi malfermas la fenestron kaj ĵetas teren la kuracilon.

—Sed kial do?—demandis la kuracisto.

—Ĉar ankaŭ mi volas vivi! —respondis la viro.

VOJAĜMOTIVOJ DE LA NACIOJ

Ĉiuj nacioj vojaĝas malsammaniere: la Anglo sekvas sian guston, la Germano sian gvidiston, la Franco sian edzinon. La Anglo veturas, la Germano transportiĝas, la Franco promenas. La Anglo faras ekskursojn kaj aĉetojn, la Germano observojn kaj ŝparojn, la Franco ĝuojn. La Anglo deziras vidi, la Germano rigardi, la Franco esti vidata.

F. Pillath

EL MUZIKTEORIO

Notoj estas la tonoj kiuj sin trovas sur la diversaj muzikinstrumentoj. Ili havas specialajn nomojn, kaj oni notas ilin surpapere per apartaj signoj. La daŭron de ĉiu noto oni rekonas per ĝia formo; kaj por noti la nunan muzikon oni uzas jenajn terminojn: Brevo, notego, duono, kvarono, kroĉo, dukroĉo, trikroĉo.

Oni metas punkton post ia noto por montri, ke per ĝi la noto devas aldone daŭri duonon de sia valoro; kunpunkta kvarono valoras daŭron de tri kroĉoj. Oni plie povas uzi dupunktojn post sama noto; per la dua punkto la noto devas aldone daŭri duonon de la unua punkto; t.e. Dupunta kvarono valoras tir kroĉojn, kaj unu dukroĉon.

LA PRINCO KAJ LA DUONBLINDULO

La araboj eltiras malfavoran aŭguron de renkontiĝo kun unuokuleblindulo. Princo eliris por ĉasado, kaj la unua persono, kiun li renkontis, estis duonblindulo. furioze, li ordonis, ke oni prenu kaj frapadu lin en malliberejon.

Li sukcesis en ĉasado kaj mortigis multe da bestoj.

Kiam li revenis hejmen, li liberigis la mizerulon, kiu diris:

Ho printco! Vi renkontis min kaj vi faras sukcesplenan ĉasadon kaj mi ... mi renkontis vin kaj mi estas frapata kaj malliberigita! Kiu do le ambaŭ ni estas malbona aŭguro?

La princo ridis kaj ordonis, ke oni faru al la spritulo malavaran donacon.

UTILO DE LA PUBLIKAJ ANONCOJ

Agento de ĵurnalanonca entrepreno tre varme rekomenas sian firmon al nutraĵvendistino, sed la lasta restas nekonvinkebla, ŝi neniel fidus en la profito de la publikaj anoncoj.

Fine la bona ideo naskiĝas en lia kapo: li diras al nutraĵvendistino:

—Vi certe scias, kiamaniere la kokino ovnaskas; ĝi krias, kriadas: kot-kot, kot-kodaaaĉ kot-kodaaaaaĉ!... Kaj ĉu vi vidis jam anasinojn ovnaskanta? La anasino ovnaskanta ja sin kaŝas neniujn vidas ĝin. Jen do la bruema kokino faras publikan anoncadon pri sia ago, ĝi laŭte sciigas al la tuta mondo, ke ĝi ovnaskas; dume la silenta anasino ne anoncas, ĝi sin kaŝas, kaj neniuj estas sciigataj pri ĝia ovnasko. Kaj kio estas la rezultato? Vi ja scias: kokinovoĵoj estas ĉie serĉataj ĝenerale uzataj, vendataj kaj aĉetataj en la tuta mondo; dume la anasinovoĵoj estas nur maloftege uzataj kaj preskaŭ nekonataj. Jen nerifutebla utilo de la publikaj anoncoj.

TRI MUŜOJ

Senzorge, gaje flirtadis tri muŝoj, en butikoj de spicvendistoj. Ili vigle zumis, ĝoje ili ĝuis la vivon; ili ja pri nenio suferis mankojn.

Jen ili malsatiĝis; oni devis tagmanĝi. Ĉiu el ili, laŭ sia gusto, volis kolekti bonan manĝaĵon ...

La unua surflugis sur farunon; ĝi satiĝis, sed, ho ve! Ĝi mortis post kelkaj minutoj. Ĉar la faruno estis falsita.

La dua surflugis sur konfitaĵon; ĝi satiĝis, sed, ho ve! Ĝi mortis post kelkaj minutoj. Ĉar la konfitaĵo estis falsita.

La tria surflugis sur muŝmortigilon; ĝi satiĝis, sed, kaj poste ĝi vigle, kontente forflugis. Ĉar la muŝmortigilo ankaŭ estis falsita.

MODERNA PENTRAĴO

Sinjoro Kolory estas moderna pentristo. Liaj pentraĵoj multe distingiĝas de tiuj de liaj samtempaj artkolegoj, precipe pri tio, ke sur ili tute ne estas rekoneble, kion ili prezentas.

Lastatempe li pentris unu belan “pejzaĝon”. Tiu ĉi pentraĵo tre plaĉis al la riĉa Baronino de Ŝmirow, ŝi do aĉetis ĝin sufiĉe kare kaj pendigis ĝin en sia salono.

Baldaŭ alia pentristo, sinjoro Penick, amiko de Kolory, vizitis la baroninon. Ŝi fiere montris al li la novan pentraĵon, demandante lin pri lia opinio.

—Belega ĝi estas, vera majstra verko,—respondis Penick—bedaŭrinde estas nur, ke ne estas vivo sur ĝi. Se vi, kara baronino, permesas al mi, tuj pentros du ludantajn knabojn sur tiu vojo, kiu traserpentumas en la mezo de la bildo.

Kun plezuro la baronino konsentis kaj S-ro Penick alpentris du knabojn ludantajn sur la dirita loko.

Post kelka tempo S-ro Penick renkontis sian kolegon Kolory, kaj rakontis al li la okazintaĵon.

—Ho, malsaĝulo! Kion vi faris?—ekkriis Kolory,—tiuj da kompatindaj knaboj certe dronos!

—Dronos?—surprize demandis Penick.

—Jes, ili dronos; ĉar sciu malfeliĉulo, ke tiu traserpentumaĵo ne estas vojo, sed rivero.

PENTRARTO

Estas tri specaj pentrartoj: akvarela, paŝtela kaj olea. En nia lando mi ne vidis, kiu pentras per paŝtelo, sed scias ke plej parte da pentristoj pentras per akvarelaĵoj koloriloj.

Antaŭ lerni pentrarton oni devas ekzerci karban desegnadon kun artika pupo. Iom antaŭe, oni ekzercis per kraĵono anstataŭ karbo, sed nun la kraĵono nur liveras al ni la uzadon por skizi la konturojn.

Kiam vi volas pentri, vi devas antaŭe posedi la necesajn instrumentojn: la stablo, paletro, la peniko ku streko, kaj kolorilkesto kun koloriltuboj. Se vi volas pentri ekster la domo, necesaj estas ankaŭ la pentra bastono kaj benketo.

En kolorilkestoĵoj oni metas dek ĝis kelkdek kolorilojn, sed plej parte da ili ne estas ofte uzataj kaj eble anstataŭigeblaj. Mi vidas pentriston kiu nur uzas tri primitivajn kolorojn. Tio tamen estas nefacila klopodo, tial la necesaj koloriloj estas bezonataj: prusa bluo, ĉiela bluo, ultramaro, indigo, smeralda verdo, herbverdo, gumiguto (tre bona kolorilo, kiun eŭropaj pentristoj ne ofte uzas), citronoflavo, terkoloro, cinabro, karmezinruĝo, kormino, sienbruno, vandikabruno, Ivora (elefanosta) nigro, kaj fine zinkblanko. La lasta multkvante uziĝis en olea pentrado, sed malofte en akvarela.

LA SOMERO

Kiel ĝuiga, kiel rava estas la somera tago en Malgrand-rusujo! Kiel, turmente-varmegaj estas tiuj horoj, kiam la tagmezo brilas en varmego kaj trankvileco, kaj blua nemezurebla oceano, kliniĝinta kvazaŭ kupolo super la tero ŝajne ekdormis, tute droniĝinte en dolĉa ripozo, ĉirkaŭprenante kaj premante en siaj aeraj brakoj la belan teron! Sur la ĉielo ne troviĝas eĉ unu nubeto; sur la kampoj ne aŭdiĝas interparoloj. Ĉio kvazaŭ mortis; nur supre en la ĉielsenfino tremkantas la alaŭdo kaj la arĝentsonaj kantoj flugas al la enamiĝinta tero; de tempo al tempo aŭdiĝas krio de mevo aŭ sonora voĉo de koturno en la stepo. Senmove kaj senpense, kvazaŭ promenantaj sencelo, staras altegaj kverkoj kaj blindigaj sunradioj lumigas pentrindajn amasojn da arbofolioj, motante sur la aliajn, kiel la nokto, malhelan ombron, sur kiu nur dum forta vento ŝprucas oraj sunradioj. La insektoj de smeralda, topaza, rubena koloroj svarmflugas super multekoloraj legomĝardenoj, sur kiuj kreskas ombrodonantaj sunfloroj ... Ho! Kiel volupta kaj dolĉplena estas la malgrand-rusuja somero!

N. Gogol

*Malgranda rusujo = Ukrainio

UTILINTA MINACO

Du rajdantaj kavaliroj interrenkontas sur ponto de rivereto. La ponto estas tre mallarĝa, tiel mallarĝa, ke unu el la kavaliroj nepre devas reiri de sur ĝi, por ebligi trapason de la alia. Sed ili, fieregaj nobeloj ambaŭ volas, ke la alia evitiru al li. Post longa disputado, fine, la unua eltiras sian glavon kaj diras:

—Se vi ne evitiros al mi, mi faros al vi la samon, kiun mi ĵus faris al alia persono kiu ankaŭ ne volis al mi evitiri.

La tondra voĉo kaj la brilanta glavo iom ektimigas la alian, kiu cedante evitiras. Poste li demandis la minacinton:

—Kion do vi faris al tiu persono?

—Kion? Li, la malmolkapa burĝaĉo, absolute ne volis cedi, do mi evitiris al li.

LA VERA RENKONTEJO

La germana ĵurnalo “Die Jugend” citas el “Instruoj por la junulars” de Prof. W. Foerster paragrafon: “La flikita pantalono,” en kiu la infanoj estas admonataj ne moki la malriĉajn kamaradojn pro flikita pantalono. Ĉi tiu paragrafo finiĝas per jenaj vortoj: “Se vi foje renkontis tiel bele flikitan knabon, kiu hontas pro la ridado de siaj kamaradoj, diru al li: “Vi estu fiera pri via patrino, vi ja portas la plej altvaloran pantalono de la mondo.”— Ĉu tio ne estas vera? Ĉu la patrino amo ne enteksiĝis en ĝin? Ĉu tio ne estas pli nobla kaj bela, ol se ĝi estus teksita el oro? Kaj se li portas ĝin kun fiereco kaj danko, ĉu ĝi ne estas vere animplena pantalono, vera renkontejo de la plej bonaj sentoj de la homo?”

F. Pillath

VEZIRO ABDUL

Unu tagon, la persa veziro, kiam li rajdis al la ŝaĥo, ekvidis antaŭ si sur la vojo, multegon da homoj amasiĝintaj kaj postulantaj sian rajton. Estis striko.

La veziro, antaŭsentante la danĝeron, kiu povus okazi halti; sed la strikantoj lin tuj ekvidis. Post kelkaj momentoj li estis ĉirkaŭita de brakfortuloj, kiuj minacis lin je mortigo, se li ne realigos tion, kion ili postulas de li, eĉ unu el la strikantoj kuraĝis ekkapti lin per lia barbo.

Post kiam li liberigis de tiuj strikantoj, li rajdis al la palaco de l' ŝaĥo, kien alveninte, li raportis al la regnestro pri la okazintaĵo.

La sekvintan tagon matene alvenis spicisto kun peto por povi paroli kun la veziro.

La veziro demandis kion li volas.

—Jen pro kio mi estas alveninta,— respondis la spicisto,—Mi venas por sciigi al via vezira moŝto la nomon de tiu viro, kiu mokis vin; li estas nomata Naĝi; mi bone konas lin, ĉar lia domo estas apud la mia. Venigu lin, por lin puni.

Post la foriro de l' spicisto, la veziro venigis al si Naĝi'n. Tiu ĉi kvazaŭ duonmorta pro timo, kaj ne sciante kiamaniere sin senkulpigi, tuj diris, ke vere li estas la kulpulo. Sed la veziro milde respondis al li:

—Ne timu. Ne pro via kulpeco mi venigis vin, sed por averti vin, ke vi havas apud via domo malamikon-najbaron, ĉar li denunciis vin. Iru do pace hejme.

ŜPAREMA

La edzino de S-ro Ŝparovski estas tre malŝparema. Ŝia edzo ĉiutage devis pagi novajn ŝuldojn faritajn de sia edzino. Foje S-ino Ŝparovski “kvazaŭ ŝparis”— Jen kion ŝi diris al sia edzo:

—Karulo, hodiaŭ mi faris bonan aferon: mi vendis mian fortepianon, por ducent spesmiloj.

—Ha!—ekkriis S-ro Ŝparovski,— Ne kredeble! Vi, kiu neniam ŝparis, vi vendis vian fortepianon, kiun aŭdi mi tiel malŝatis, por rehavi la monon kiun ...

—Sed lasu min fini,—diris la edzino,— mi vendis tiun fortepianon, kaj aĉetis alian, pli belan, por kvin cent spesmiloj, kaj tiamaniere vi ŝuldas nur tri cent spesmilojn.

UNU BONA PASTRO

La raveno Pinkusfeld estis vere bonfarema pastro. Li kaj lia edzino multe helpis la malriĉulojn, kvankam ili mem ne estas riĉaj.

Foje, la rabeno, estante hejme tute sola, enprofundiĝis en siajn teologiajn studojn, kiam eniris en lian ĉambron malriĉa Hebreino, konata almozulino, kiu petegis pri eluzitaj vestoj. La rabeno eltiris la ŝrankon kaj rapide elprenis el ĝi kelkajn malnovajn vestojn, inter ili ŝititajn ŝtrumpojn, kaj donacis ilin al la almozulino. Tiu ĉi, dankante, foriris.

Baldaŭ revenis hejmen la rabenedzino, al kiu la rabeno tuj rakontis la okazintaĵon.

—Mia Dio! Mia Dio!—ekkriis la edzino, —kion vi faris! Ja en unu el tiuj ŝtrumpaĉoj mi kaŝis kvindek spesmilojn! Kaj nun ŝi forportis...

Konsoliĝu mia kara,—respondis la rabeno: — ne malesperu, certe nenio malagraba okazos pri tio ĉi; ŝi ja trovos jam rimedon por uzi ne nur la vestojn, sed ankaŭ la monon.

NETITOLITA

En ĉarma printemp, memoro
Malnova revivas en koro.
Sopir' je l'kunulo tiama
Forgeso pri tempo la flama.
Soleco! La ofta turmento!
Sciigo, post longa silento
Pleniĝas per skribo pasia.
Mi legas kun larm' emocia.

F. Dor

PRI LA ESTONTECO DE LA SUNA SISTEMO

Ĉu la suno devos nepre iam estingiĝi aŭ ne, estas ankoraŭ problemo tre duba. Mi pensas, ke ni tute ne havas sufiĉajn argumentojn por montri logike nepran estontan estingiĝon de la suno. Ebla estas tute kontraŭa okazo—la pli aŭ malpli longedaŭra revarmiĝado de la suno per kaŭzo tute simpla kaj videbla por ĉiuj, nome —per falado sur ĝian superaĵon, de la multnombraj aerolitoj, vojaĝantaj nune tra la spaco per grandegaj, konfuzaj vojoj en formo de kometoj, renkontiĝantaj kun nia suna sistemo dum ĝia rapida irado al la ankoraŭ nekonata celo en la stelaro Heraklo. Multaj aerolitoj fariĝis jam niaj sunsistemaj kunirantoj, aliaj eniras nian sistemon aŭ eliras el ĝi, laŭ okazoj de ilia kaj nia movado.

En nuna stato de la scienco ni tute ne povas precize antaŭdiri: kioman kvanton da varmego ricevos nia suno per la aerolitoj, falantaj sur ĝin eĉ en proksime venontaj jaroj. Novaj grandegaj aerolitamasoj, renkontiĝontaj en nia rapida flugado, povas ne sole malpermesi al nia suno estingiĝadi dum multaj miljaroj, sed kontraŭe ili povas ĝin ankaŭ ekbruligi kaj igi nian teron travivi ankoraŭ unu el pasintaj geologiaj statoj de ĝia ekzistado, kiam sur la polusoj kreskadis palmoj kaj vivadis elefantoj.

NOVA ENCIKLOPEDIO

Devo: io, kion oni postulas de aliaj.

Feliĉo: kvankam la feliĉo frapas unufoje la pordon de ĉiu homo, tamen ĝi ne certe laŭte frapas.

Filozofio kaj poezio: filozofio en metas fenestron al homoj,

poezio—fornon.

Forto: nia forto sufiĉas por malfeliĉo de aliaj sed ne por ilia feliĉo.

Ĝentilulo: homo kiu diras, kion li ne opinias.

Komitato: se Dio formus komitaton por la kreado de la mondo, la universo ankoraŭ ne estas preta.

Kuraĝo: batali per la glavingo kiam estas disrompita la glavo.

Mensogado: oni plej mensogas antaŭ politika elekto, dum militado kaj post ĉaso.

Morto: multaj homoj mortas ne kreintaj ion, neniu mortas ne deturninta ion.

Opinioj: najloj, kiujn oni enigis des pli profunde, ju pli oni ilin surbatas; tial evitu disputojn.

Politikistoj: publikaj akvoverŝistoj, kiuj povas krei koton kiam la suno lumas, sed ne sunlumon kiam troviĝas koto.

P. Ahlberg

GUELIVER EN LILIPUTLANDO

Ĉar mi malsatis mi penis montri al ili ke mi bezonis manĝaĵon. Mi metis fingron en la buŝon kaj rigardadis petante ke oni donu al mi nutraĵon. La parolinto tuj komprenas min.

Li ordonis ke oni metu ŝtupetarojn al miaj flankoj, multope la etuloj supreniris kaj marŝis al mia buŝo portante korbojn, plenajn de viandoj. La viandaĵoj havas la saman formon kiel kuirpecoj, kiujn ni havas hejme, lumbaĵo fermuro, k.t.p, sed malpli grandaj ol flugiloj de alaŭdo.

La etuloj donis al mi la nutraĵon kiel eble plej rapide. Mi manĝis tion, ke mi mirigis ilin. Post la manĝo, mi faris signon, ke mi volas trinki. Tial ili suprentiris sur min unu el siaj plej grandaj bareloj. Ili rulis ĝin al mia mano kaj malŝtopis ĝin.

Ĉar la barelo havis la grandecon de nur duono de vinglaso, mi eltrinkis ĝin per unu engluto. La vino havis bonegan guston. Ili alportis al mi duan barelon. Mi trinkis la vinon kaj petis pri pli, sed neniom restas. La etuloj faris signon, ke mi ĵetu malsupren la du barelojn.

Oni ekkriis por averti la homamason sur la tero, ke ili donu spacon. Mi ĵetis la barelon ĉielen. Vidante ilin en la aeron, la etuloj ekkriis tre laŭte.

KOLORIGO DE NATURAJ FLOROJ

Oni scias, ke violoj koloriĝas verden per la vaporo de amoniako. Por tion fari, ne necese estas meti la florojn en la likvaĵo; sufiĉas meti ilin en ŝtopitan botelon, kien oni verŝas iom da amoniako.

La influo de amoniaka vaporo ŝanĝas la koloron ankaŭ de aliaj floroj. Ekzemple, la blanka anemono de arbaroj prenas belan flavan koloron. La violaj, ruĝaj, blankaj balzamenoj fariĝas respektive verdaj, ĉokoladbrunaj, flavaj. La trikolora konvolvulo, la koreopsoj, prenas belajn multkolorajn nuancojn; la ruĝa geranio fariĝas blua, la diversaj levkojoj verdaj aŭ nigraj. Tre multaj floroj estas

tiel influantaj de la amoniaka vaporo.

Sed oni ankaŭ povas produkti tiujn kolorajn ŝanĝojn ne enfermante la florojn: oni surŝprucigas per vaporizilo likvaĵon konsistantan el 8 partoj da sulfurika etero kaj 2 partoj da amoniako.

REKORDO DE MALRAPIDECO

En la pariza ĵurnalo “Le Matin” ni legas la sekvantan kuriozaĵon:

De la urbo Origny-Saint-Benotte al la urbo Eu, ambaŭ en Francujo, letero bezonas preskaŭ 37 jarojn por alveni. La 27an de Oktobro 1876, S-ro Clery Jeune sendis el Origny, al S-roj Harel kaj Deponilly en Eu, unu komercan fakturon, afrankitan per 25 centima poŝtmarko, laŭ la poŝta tarifo de tiu tempo en Francujo. La leter alvenis la 6an de Junio 1913 en Eu. — Rimarkinde estas, ke la sendinto kaj la ricevintoj, dank’al Dio vivas ankoraŭ.

La nomita ĵurnal prezentas al siaj legantoj la aŭtenikan fotografiaĵon de la koverto de tiu ĉi letero, sur kiu estas klare videblaj la poŝtaj stampoj.

PRINTEMPAJ AKVOJ

Ankoraŭ kuŝas neĝ’ de l’nord’,
Jam brue kuras la torent’,
Forpelas dormon de la bord’,
Kaj vekas ĉion el silent’.

Kaj krias ĝi de rand’al rand’:
“Tra mond’ vojaĝas Maj’ sen bar’!
“Ĝi nin dissendis tra la land’,
“Ni estas ĝia senditar’.”

MIRAKLA FULMO

En la somero de jaro 1908, S-ino J. Locze kaj aliaj kvin virinoj, terkulturistinoj, sur la kampo apud la vilaĝo Koppanyszanto (Hungarujo), rastkolektis fojnojn. Posttagmeze la vetero fariĝis terura, fulmadis kaj tondradis; la ses virinoj, pro timo, amasiĝis, kune kaj jen fulmo subite frapis tiun virinan amason. Kvin el ili mortis, kaj S-ino Locze mutiĝis.

En la jaro 1913, je la sama tago, sur la sama loko, la muta S-ino Locze kaj ŝiaj du magrandaj filinoj, sin okupis je sama kamplaboro: rastkolektado de fojnoj. Denove la vetero fariĝis terura: fulmadis kaj tondradis. Jen fulmo subite frapis en la teron, apud la tri virinoj, kiuj tuj svenis. Proksime laborantaj kamparanoj portis hejmen la tri senkonsciajn virinojn, kiujn, en la vilaĝo, kuracisto rekonscigis. Tiam ho, miraklo! La antaŭ kvin jaroj mutiĝinta virino ekparolis; ŝia unua diro estis:” Sinjoro doktoro, ĉu miaj filinoj vivas?”

S-ino Locze perfekte reakiris sian parolkapablon; ankaŭ ŝiaj filinoj fartas bone.